



# PENSEO

*N-ro 374*

*dec. / 2022*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 33-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Tiberio Madonna (Italio)



### LA FOLIO

La folio  
de nia amikeco  
estis farita el papero.

Sur ĝi estis skribita «benko ĉe l' suno»  
estis skribita «lernejo»  
estis skribita «promenado»  
estis skribita «maro».

Ĝi estis farita el papero.

Ĝi elfalis el miaj manoj sur la teron.  
Vi reprenis ĝin. Vi forblovis  
la polvon.

Estis skribita «malvarma piceto»  
estis skribita «brioĉo kun glaciaĵo»  
estis skribita «Adriana».

Ĝi estis farita el papero.

Ĝi elglitis el niaj manoj, falis  
sur la flakon de miaj larmoj.  
Vi reprenis ĝin. Vi ĝin sekigis  
per la varma elspiro de viaj vortoj.

Estis skribita «preĝejo».

Ĝi estis farita el papero.

Vi eltiris ĝin el miaj manoj  
kaj ĝin buligis.

Mi ĝin remalfermis.  
Vi glatigis ĝin.

Estis skribita «placo».

Ĝi estis farita el papero.

Vi ĝin deprenis el miaj manoj  
kaj ŝiris en pecojn.  
Mi gluis ĝin  
per la glubendo de l' pacienco.

Estis skribita «jako kaj ŝuoj».

Ĝi estis farita el papero.

Denove ĝi forŝoviĝis ĝi falis  
en kamenon. Kaj sur la fajro de viaj timoj  
ĝi brulis.

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



### Ascendo

Por ascendi  
sufiĉas  
eklumigi  
la koron.

*Juiz de Fora, 14/10/2022.*

### Kuracilo

En ĉi malsana mondo  
ne frenezigu!  
La menson nutru  
kun optimismo

per ĝojplena semo.  
En la menson semu  
nur la esperon,  
kiu ne mensogas,  
kaj neniam mortos!

*Juiz de Fora, 19/11/2022.*

## Ángel Arquillos (Hispanio)



### Kvietigi viajn larmojn

Kvietigi viajn larmojn  
mi ne povas,  
ĉar mi kun granda aflikto  
ade ploras.

Pluvegas,  
ĉar ankaŭ la ĉielo  
klopodas kaj sentaŭge  
ja fiaskas,  
kaj mia koro tremas  
kaj miaj piedoj hastas.

Kvietigi viajn larmojn  
mi deziras,  
ĉar mi tute konfuza  
ĉe malvarmega obskur'  
ade sopiras.

Mi ĉiam fidis Dion,  
kaj nun mi petegas  
tremanta pro deliro  
de Di', la Plejpotenca,  
forigi mian timon.

## Moisey Bronshteyn (Rusio)



Novembre la unuaj frostoj  
alvenis,  
direktis min al kruda proz', kaj  
plu ĝenis

min mava, morna, kontraŭsenca  
tumoro  
de la milita fum' incensa  
en foro.

Beleco de plej puraj rimoj  
ne taŭgas,  
se ĉiutage pri l' viktimoj  
mi aŭdas,  
se nekonat' al nekonato  
feroce  
rapidas por mortiga bato –  
eĉ proze

mi ne scipovas pri la fend' en  
konscio  
de l' tuta land' fari amendon;  
ne, eĉ pri ĉio,  
kio la cerbojn fatrasigis  
senhonte  
kaj min al pilorio ligis  
enmonde.

Sed se restados nia kuno  
sen rompo,  
se l' korojn movos hela juno  
sen trompo,  
la plag' ne restos por ĉiamo  
sur Tero,  
kaj certe, certe venkos amo  
kaj vero.

## Klaus Friese (Germanio)



### Strangaj nuboj

Tie nun supre, en blua ĉiel',  
migras vatbuloj, blankaj figuroj.  
Estas la ver', ne simple fabel',  
lerta artist' kun akra martel'  
zorgis pri la konturoj.

Ne longe videbla sur la ekran'.

Jen nova form', kia freŝa aspekt'.  
Ĝi malaperas, kia ĉikan'!  
Rapida ŝanĝo, jen nova plan'!  
Komprenas la arkitekt'.

Ankoraŭ aspekto kiel lepor',  
kaj tuj poste la nova vizaĝ'.  
Ne estas temp', nur restas vapor',  
kunpuŝita de forta motor',  
feliĉa sur la vojaĝ'.

Vizaĝo de l' pork' aŭ estas ĉeval' ?  
Kiu decidas? Tro peza demand'!  
Neklara la bild', ĉu estas narval' ?  
Ĝi naĝas en la ĉiela ĝangal'!  
En maro sen ia strand'.

## Wally du Temple (Kanado)



### Kosmologio de Akvoguteto

El la esenco de La Nekconceptebla,  
La Granda Mistero  
Energion malrapidigis  
Por videbligi materion eksperimente.  
Atmosfera enkorpiĝo, la akvoguteto  
Aperis el La Nevidebla Ĉio, nude,  
Sentis sian emon por sia memo kaj  
Memkonscie kovris sin per nubo,  
Enuiĝinte resti suspendita ĉiele, ribelis.  
Elpelinta de ĉielo, eksentis potencialon  
Por kontrasta memkonstato  
Kiam faliginta desupre suben  
Trafis glaĉeron, frostiĝis ĉe monta pinto,  
Kuraĝon kaj spertojn gajnis  
Degelis, strebis, identige superis obstaklojn  
boris vojon suben tra morenon  
AHH la defion kaj gloron de individuismo.

Akvoguteto en rivero  
Gravuris plonĝe trapasejojn  
tra valojn, kaj kampojn,  
trafis montojn kaj skulptis kanjonojn.

Karesis fiŝetojn, kirliĝis sub akvofaloj  
Bruetis kante supre de ŝtonetoj  
Miris pri ludantaj lutroj  
Speguligis smeraldajn lagojn  
Kaj tre sukcesa gratulis sin fiere, kaj  
Serpentume ripozis en delto de plenumo!  
Identiga memfido kontentiga!  
Sed teruro!  
Subite Nenio kaj Ĉio ĉie  
Akvogutetoj ĉie ĉie ĉie  
Sed nenio kadre rekonebla gutetpersone  
Nenio diferencige spertita de kulturmemoro  
nek moreno, nek valo, nek lago,  
nek kanjono, nek delto, nek akvofaloj  
Nur homogena videbla energio  
La Maro!

## Jadranka Miric (Serbio)



### Familio

En malfrua aŭtuno  
renkontis mi vin.  
En via forta brakumo  
mi provis kaŝi min.

Malfeliĉo trafis nin.  
Via mano forte tenis la mian  
spite al malbona sorto nia.  
La ĵetita nerompebla ankro savas nin.

### Aŭtuno

Neatendita varma aer'  
tre tenere adiaŭas  
la falintan foliaron  
surtere putrantan ĝis vesper'.

Vigle flugas birdoj  
alten. Iuj kaŝis sin  
inter preskaŭ nuda branĉaro.  
Nur laboras ankoraŭ diligentaj  
formikoj.

Sur branĉoj en arbar'

gaje saltetas sciuroj ruĝetaj  
 ĝuante en la sunradiaĵo.  
 Salutas ilin kverado de turta par'.

## Elena Popova (Bulgario)



# Meditadoj

1.  
 Homoj mortis por  
 la Libero. Aliaj  
 ĝin aĉetis... Ja  
 La Libero ekploris:  
 “La mono estas fortaj!...”

2.  
 Fiŝ' je l' ĉielo.  
 Grizaj nuboj- ondoj ja,  
 samaj fantomoj.  
 Invito al maro? Ne,  
 revoj de pensiulo!...

3.  
 Senhoma domo.  
 La olduloj – en l' ĉiel’’,  
 idoj – migrantoj.  
 Hundo ilin atendas,  
 gardas la vakan domon.

4.  
 Arda somero.  
 Pesto flirtigas flagon,  
 post ĝi – dezerto.  
 Pesto nigra murdigas  
 kaj la homan esperon.

5.  
 Homo el ŝtono –  
 gloro por la skulptisto.  
 La temp' silentas.  
 Kaj nun ne nur pri mono  
 ĉiu homo laboras...

6.  
 La sun' printempe  
 rapidas vekiĝi kaj  
 kisi la florojn.  
 Sed ili estas tristaj –  
 prujno jam ilin kisis...

7.  
 Ĉe l' mara bordo  
 restis mia rev' – estis  
 juna, naiva...  
 Trista kaj sola estis,  
 kiel la vintra maro.

8.  
 Birdo kvivitas  
 kaj la aron kunvokas.  
 Fruktoj odoras.  
 La Natur' malavaras –  
 estas donac' por ĉiuj.

9.  
 Endormigas min  
 violona orkestro  
 kun solist' Grilo.  
 Ĝi lacecon ne konas –  
 ludas Lunan sonaton.

10.  
 Rozo odoras.  
 Papilio alflugis  
 kaj ĝin ekkisis.  
 Resonis: La beleco  
 tera estas miraklo...

11.  
 Birdoj forflugis  
 denove suden. Bonan  
 vojon, birdaro!  
 Ĉiam mi estas sola,  
 kiel en vaka nesto.

12.  
 Aŭtun' ekiris  
 senbrue. Nub' ekploris  
 dum adiaŭo.  
 La arboj jam nudiĝas –  
 falas folioj – larmoj...

13.  
 La sun' vintre sin  
 disdonas aliloke.  
 Neprofiteme.  
 Adreson ĝi ŝanĝas, sed  
 la devon ne forgesas.

14.  
 Vintro –artisto

pentras per blankaj floroj  
siajn revojn. Dum  
malsata homo serĉas  
pecon da pano trovi.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### Memore al Avo

Oraj jaroj foris sen reveno,  
Vi aperas songe kun la beno.  
Jen afablas via karvizaĝo,  
kun imago de la hejmvilaĝo.

Sopirante mian infanecon,  
mi ankoraŭ sekvas decon.  
Karmemore al vi, mia avo,  
mi sopiras al via bravo.

Survoje tombejon viziti,  
mi emas pri vi mediti.  
Printempa brizo milde blovas,  
eternan amon mi nun trovas.

Salikoj verdas en pluveto,  
dolĉamaras larme la poeto.  
Animo sola estas karesata,  
anksia sento tiel kompata.

Antaŭ via tombo mi tuj riverencas,  
kaj la kulton kun vino komencas.  
Vi senzorge vivu sur ĉielo,  
tute apud la plej hela stelo!

## El Ĉina Antikva Poezio

### Xin Qiji (1140-1207)

—laŭ melodio *Malbela sklavo*

Junaĝe mi ne konas, kio estas la ĉagreno,  
sed emis supreniri la etaĝdomon  
ja emis supreniri la etaĝdomon,  
priskribi verse la ĉagrenon jen per falsa spleno.

Nun mi jam plene vivas tra l' ĉagreno,  
sed mi tuj haltas en parolo pri ĝi,  
sed mi tuj haltas en parolo pri ĝi,  
mi male laŭdas: kia friska la aŭtun' sen ĝeno!

### Serĉi umeon

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Oldiĝante mi ne emas zorgi pri la floroj.  
Pro prefero al umeo mi ĝin serĉas laŭ rivero,  
unu frondo da umeo sola floras  
por heroldi venon de l' printempo en espero.  
Ĝi ne ĉarmas kiel la aliaj floroj,  
sed kuraĝas stari kontraŭ neĝa la vetero.

Mi nur la okulojn ja regalas per enmonta belo,  
skribas mi la versojn pri l' ume' en senco freŝa.  
Riverfluo kaj bambuoj en nebula nub-tenero  
aldoniĝas al la montpejzaĝo interesa.  
Pro ebrio mi forgesas la revenan vojon ĉe  
vespero.

### Ĉe pavilono Korplaĉa

—laŭ melodio *Akva drako*

Sub aŭtun-ĉielo vasta je mil lioj  
akvo etendiĝas al la horizonto fora.  
Mi rigardas malproksimajn montojn,  
kiuj ŝajnas jada harplinglaro kapdekora.  
Jen pro tiaj larmeltiraj scenoj en mi  
tuj naskiĝis sent' ĉagrena kaj rankora:  
La subira suno pendas base,  
triste grakas jen sovaĝansero sola,  
kaj mi, jen fremdulo, vagas en la sudo.  
Rigardante l' spadon nun kun kor' dolora,  
mi frapadas balustradon kolereksplodeme,  
ve, neniuj povus veni al kompren' bonvola,  
kial mi ascendas altan turon  
por rigardi malproksimen nun kun sent'  
angora.

Ne menciu la hejmlokan fiŝ-frandaĵon,  
dum l' uesta vento blovas forte,  
ĉu mi devus hejmenveni malgraŭ oficado?

Se mi nur konsiderus jen komforte  
miajn kampojn, domojn egoiste,  
mi min sentus basa hontem-morde,  
antaŭ tiuj patri-amaj talentuloj.  
Jaroj pasis tra ventpluvoj ja malorde,  
kiel homoj jen vegetas kvazaŭ arboj!  
Ĉagreniĝas mi ja malbonsorte  
kaj alvokas kant-knabinon per manikoj ruĝaj  
viŝi miajn larmojn konsol-porte.

*Elĉinigris*



**Vejdo (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

**Huang Geng (?-?)\***

*Ankrite en Linqing*

Ankriĝas ĉe salika ombro pasaĝerboato,  
sur lago noktomeza friskas la aero flua.  
La luno diseriĝas en muara ondiĝado,  
kaj bonodoras lotusfloroj en zefiro ĝua.

*\*La poeto vivis dum la periodo de la Song-dinastio  
(1271-1368)*

**Seng Zhinan (?-?)\***

**VERSKVARO**

Al ombra arbego por ligo l' boaton mi tiras,  
Eosten de l' ponto pere de baston' mi aliras.  
La vesto subtile humidas en pluvo printempa,  
Al mia vizaĝo ĉi vento karese zefiras.

*\*La poeto vivis dum la periodo de la Suda  
Song-dinastio (1127-1279).*

**Ye Shaoweng (?-?)\***

**Malsukcesa vizito al ĝardeno**

La mastro eble gardas muskejon de fuŝtretoj,  
mi do ne povas ovri l' verg-pordon per frapetoj.  
Ne printemp-belon povas enfermi la ĝarden',  
mur-eĝe pavas ruĝa abrikot-frond' sen cedoj.

*\*La poeto vivis dum la periodo de la Suda*

*Song-dinastio (1127-1279).*

**Weng Juan (?-?)\***

**Improvizajo en vilaĝo**

Deklivo monta verdas, blankbrilas rizkamparo,  
Kaj eĥas en pluvbrumo la kukola fanfaro.  
Aprile en vilaĝo nenifarantoj raras,  
La raŭpobredon sekvas plantado en preparo.

**Zhang Yu (?-?)\***

**Bredistino de silkraŭpoj**

Ŝi hieraŭ iris vendi silkon en foiro  
kaj, survoje al la hejmo, larmis intensive:  
Tiuj, kiuj portas vestojn el silk' kaj sateno,  
estas ne bredistoj de silkraŭpoj efektive.

*Elĉinigris*



**Minosun (Ĉinio)**

\*\*\*\*\*

**Lu You (1125-1210)**

**Indigno**

Junaĝe mi ne konis vivan malfacilon,  
Nun mi indignas pro perdintaj nordaj lokoj.  
En venta nokt' armitaj ŝipoj pretis borde,  
soldatoj gardis la pasejon en neĝ-blokoj.

Ho! vanis la promeso pri patruj-defendo,  
ne plenumiĝas l' ambici', griziĝas haroj.  
Deklaro\* de Zhuge Liang estas tre laŭdinda,  
Neniu havus lian gloron dum mil jaroj!

*\* Deklaro estas mobilizodeklaro, kiun skribis Zhuge Liang en  
p.k.227. Tiam li ekiris al nordo-atako kun siaj soldatoj kaj volis  
pereigi Wei-regnon. Antaŭ kaj post la batalo li dufoje sendis  
leteron al la reĝo Liuchan. Du leteroj estas la fame konataj kiel  
"Antaŭa Mobilizodeklaro" kaj "Posta Mobilizodeklaro".*

*Elĉinigris*



**Ardo (Ĉinio)**



# Zhuangzi

## ĈAPITRO TRIDEKA

### Paroloj pri la spado-skermado

#### §30-01

Antaŭ multaj jaroj la reĝo Wen de la regno Zhao tiel pasie amis spado-skermadon, ke li havis pli ol tri mil spado-skermistojn, kiuj kolektiĝis en lia palaco. Tage kaj nokte ili bataladis inter si por distri la reĝon. Kvankam pli ol cent spadistoj estis mortigitaj aŭ vunditaj en ĉiu jaro, tamen la amo de la reĝo al la spado-skermado neniam velkis. Tri jaroj pasis, kaj la regno Zhao malfortiĝis, sekve najbaraj regnoj komplotis por ĝin ataki.

Kui, la kronprinco, estis tre maltrankvila pri tio. Li konsultis siajn subulojn, promesante:

“Kiu ajn povos persvadi la reĝon meti finon al la bataladoj de la spadistoj, estos rekompencita per mil mezuroj da oro.”

“Nur Zhuangzi povos plenumi tiun ĉi taskon,” diris liaj subuloj.

La kronprinco tuj ordonis al sia subulo sendi mil uncojn da oro al Zhuangzi. Tamen tiu ĉi rifuzis akcepti la donacon kaj iris vidi la kronprincon kune kun la sendito. Li demandis la kronprincon:

“Kion vi volas, ke mi faru por vi? Kial vi donacas al mi tiom multe da oro?”

“Mi aŭdis,” diris la kronprinco, “ke vi estas homo saĝa kaj kapabla. La donaco estis prezentata al viaj sekvantoj. Nun ke vi rifuzis ĝin akcepti, mi havas nenion por diri.”

“Mi aŭdis,” diris Zhuangzi, “ke vi deziras, ke mi persvadu la reĝon forlasi sian manion al la spado-skermado. Se miaj paroloj malplaĉos al la reĝo kaj sekve mi ne plenumos vian deziron, tiam mi estos punita kaj mortigita. Tiukaze, kian utilon via oro povos havi por mi? Kontraŭe, se mi sukcesos persvadi la reĝon kaj tiel plaĉos al vi, tiukaze, kian peton la reĝo povos rifuzi al mi?”

“Nu, bone,” diris la kronprinco. “Sed nia reĝo volas vidi nur tiujn spado-skermistojn. Kion fari do?”

“Tio ne estas problemo,” diris Zhuangzi, “ĉar ankaŭ mi estas lerta en la spado-skermado.”

“Sed la spado-skermistoj,” diris la kronprinco, “kiujn la reĝo volas vidi, ĉiuj havas harojn distaŭzigitaj, kun elstaraj fasketoj da haroj sur la tempioj, kaj portas ĉapon kun la supro pendanta malsupren kaj kun rubandoj maldikaj kaj senornamaj. Ili ĉiuj portas mallongan batalveston kaj havas koleregan mienon. Ili parolas krude kaj balbute. Estas strange, ke nur tiajn homojn la reĝo amas. Se vi iros vidi la reĝon en la klerula robo, la afero certe malsukcesos.”

“Do bonvole pretigu por mi kostumon de tia spado-skermisto,” diris Zhuangzi.

Tri tagojn pli poste, Zhuangzi, portante la spadistan kostumon, iris al la kronprinco, kaj tiu ĉi iris kune kun Zhuangzi al la reĝo, kiu atendis ilin, kun sia akra spado malingita.

Zhuangzi eniris per malrapidaj paŝoj en la palacon. Li ne ĵetis sin vizaĝaltere antaŭ la reĝo.

“Kian konsilon do vi havas por doni al mi,” demandis la reĝo, “ke vi enkondukigas vin per mia filo?”

“Mi aŭdis,” diris Zhuangzi, “ke via majesto amas la spado-skermadon, tial mi petas aŭdiencon por montri al vi mian skermadon.”

“Kiel do vi povas vin defendi kaj venki vian kontraŭulon per via spado-skermado?” demandis la reĝo.

“Kiam mi svingas mian spadon,” respondis Zhuangzi, “mi povas venki unu kontraŭulon en ĉiu deko da paŝoj, kaj mi povas antaŭenpaŝi mil liojn sen renkonti mian egalulon.”

“Vi do estas nesuperebla en la tuta mondo,” diris la reĝo kun granda ĝojo.

“Mia spado-skerma arto,” diris Zhuangzi, “konsistas en tio ĉi: en la komenco mi intence vidigas mian ŝajnan malfortecon al mia rivalo kaj lasas al li profiti la avantaĝon. Poste mi prenas ofensivon kaj penas trafi lin antaŭ ol li havus la okazon min tuŝi. Mi volus, ke vi donu al mi okazon por montri mian skerman arton.”

“Vi ripozu en mia gastejo kaj atendu kelkan

tempon,” diris la reĝo. “Kiam la preparoj estos finitaj, mi vokos vin al la konkurso.”

Dum la postaj sep tagoj la reĝo metis siajn spado-skermistojn en provan konkurson, dum kiu pli ol sesdek spadistoj estis mortigitaj aŭ vunditaj, kaj fine elektis el la konkursantoj kvin aŭ ses plej lertajn. Li ordonis, ke la elektitoj atendu ĉiu kun sia spado en la mano starante antaŭ la palaco. Poste li sendis alvoki Zhuangzi kaj diris al tiu:

“Hodiaŭ mi lasas al vi batali kun tiuj ĉi miaj spadistoj.”

“Jam longe mi atendis tiun ĉi tagon,” diris Zhuangzi.

“Kiaspecan spadon vi kutime uzas, longan aŭ mallongan?” demandis la reĝo.

“Kia ajn taŭgas al mi,” respondis Zhuangzi. “Sed mi havas tri spadojn, el kiuj via majesto estas petata elekti unu por mia uzo. Bonvole permesu al mi fari klarigon pri la tri spadoj, antaŭ ol komenci la konkurson.”

“Klarigu do al mi,” diris la reĝo.

“La tri spadoj estas,” diris Zhuangzi, “la spado de la Filo de la Ĉielo, la spado de la reĝo, la spado de la simpla popolano.”

“Kia do estas la spado de la Filo de la Ĉielo?” demandis la reĝo.

“La spado de la Filo de la Ĉielo,” respondis Zhuangzi, “estis farita el la valo Yanxi kaj la monteto Shicheng kiel la pinto, la monto Tai en la regno Qi kiel la klingo, la regno Jin kaj la regno Wei kiel la dorso, la teritorio ĉirkaŭ la ĉefurbo de Zhou kaj la regno Song kiel ringo, kaj la regno Han kaj la regno Wei kiel la tenilo. Ĝi estas ingita per la necivilizitaj triboj, envolvita en la kvar sezonoj, ĉirkaŭita per la akvoj en la maro Bohai, kaj rubandoligita per la monto Heng. Ĝi regas la mondon per la kvin elementoj kaj juĝas la justecon kaj la maljustecon per la punoj kaj la virto. Ĝi akriĝas sian tranĉandon per la energio de la jino kaj la jango, konservas sian povon per la varmo de printempo kaj sumero, kaj funkciadas per la forto de aŭtuno kaj vintro. Nenio povas rezisti al ĝia bato, kien ajn ĝi estas svingata: ĉu antaŭen, ĉu supren, ĉu malsupren, ĉu flanken. Kiam ĝi estas svingata supren, ĝi fendas ŝvebantajn nubojn en la ĉielo; kiam ĝi estas svingata

malsupren, ĝi rompas la fundamenton de la tero; kiam ajn ĝi estas uzata, ĝi povas korekti la reĝojn kaj subigi la tutan mondon al sia regado. Tia estas la spado de la Filo de la Ĉielo.”

“Kia do estas la spado de la reĝo?” demandis la konfuzita reĝo.

“La spado de la reĝo,” respondis Zhuangzi, “estis farita el la homoj kuraĝaj kaj inteligentaj kiel la pinto, la homoj honestaj kiel la klingo, la homoj virtaj kaj kapablaj kiel la dorso, la homoj lojalaj kaj saĝaj kiel la ringo, kaj la herooj kiel la tenilo. Simile al la spado de la Filo de la Ĉielo, nenio povas rezisti al ĝia bato, kien ajn ĝi estas svingata: ĉu antaŭen, ĉu supren, ĉu malsupren, ĉu ĉiuflanken. Supre, ĝi obeas la ordonon de la ronda ĉielo kaj sekvas la sunon, la lunon kaj la stelojn. Sube, ĝi obeas la leĝojn de la kvadrata tero kaj sin konformigas al la kvar sezonoj. Inter la ĉielo kaj la tero, ĝi respondas al la ĝenerala volo de la popolo kaj tiele pacigas la tutan landon. Kiam ajn ĝi estas uzata, la tuta lando kvazaŭ estas skuata de tondrego, kaj la loĝantoj interne de la kvar landlimoj sin submetas al la reĝo kaj obeeme aŭskultas liajn ordonojn. Tia estas la spado de la reĝo.”

“Kia do estas la spado de la simpla popolano?” demandis la reĝo.

“La spado de la simpla popolano,” respondis Zhuangzi, “estis farita por tiuj, kiuj havas harojn distaŭzitaj, kun elstaraj fasketoj da haroj sur la tempioj, kaj portas ĉapon kun la supro pendanta malsupren kaj kun rubandoj maldikaj kaj senornamaj. Ili ĉiuj portas mallongan batalveston kaj havas koleregan mienon. Ili parolas krude kaj balbute. Tiuj spadistoj sin batas reciproke per sia spado antaŭ la spektantoj. Rezulte de tio, ili estas aŭ senkapigitaj aŭ havas siajn internaĵojn trapikitaj de la kontraŭulo. Tia estas la spado de la simpla popolano. La spadisto, kiu svingas tian spadon, neniel diferencas de batalkoko. Li povas pereji en ĉiu momento dum la interbatalo, tute senutile al la regno. Mi pensas en mi, ke vi, kiel la nobla reĝo, devus abomeni la spadon de la simpla popolano anstataŭ ĝin ami.”

La reĝo prenis Zhuangzi je la mano kaj kondukis lin en la aŭdiencan ĉambregon, kie lia kuiristo alportis nutraĵon por lin regali. Sentante honton, la reĝo paŝadis



ĉirkaŭ la tablo tri fojojn.

“Bonvole sidiĝu, via majesto, kaj vin kvietigu,”  
diris Zhuangzi. “Miaj paroloj pri la skermado jam estas  
finitaj.”

Post tio la reĝo Wen de Zhao enfermis sin en la  
palaco dum tri monatoj, kaj ĉiuj liaj spado-skermistoj  
mortigis sin sur la loko, kie ili loĝis.

*Elĉinigiŝ*



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

## Ĉineske

**Yi Qiao (Ĉinio)**

### Ume florado

— laŭ ĉinesko *flirta kanto*

Ume', ume' —  
artista bonide'.  
Floradas en belo,  
spite de negĝ-gelo.  
Loge, loge  
miras senmensoge.

\**Flirta kanto (ĉine: Tiaoxiaoling): ĉina fikforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

### Plaĝo

— laŭ ĉinesko *Kanto de akva horloĝo en nokto*

Bonas tag', freŝbele,  
suno brilas hele.  
Ĉe plaĝo, apud mar'  
amuloj en par'.

Tre sorĉas, tre dolĉas,  
amo kore torĉas.  
Sopiras, la pasi'  
kun rava radi'.

\**Kanto de akva horloĝo en nokto (ine: genglouzi): ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de 33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb / xcc,xdd (x=senrima)*

### Maro

— laŭ ĉinesko *Lotusfolia taso*

Al ĉiel' similas,  
brilas  
blua scen'.  
Malantaŭ la montaro,  
maro  
muĝas jen.

### Beno

— laŭ ĉinesko *Lotusfolia taso*

Nova sent' fidelas,  
helas  
en korfont'.  
Nin verdespe' subtenas,  
benas  
tra la mond'.

\**Lotusfolia taso (ĉine: Heyebai): ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj, laŭ rimaranĝo aab,ccb*

**Jadranka Miric (Serbio)**

### Aŭtuna vetero

— laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo*

Mateno  
laktokolora.  
Anonciĝas nebulo.  
Jen, sunradio ora!  
Iĝas tag' flora.

Arbaro  
ĉi multkolora

banas sin en varmo!  
Dum nebulo densfora  
iĝas vapora!

Briletos  
ĉi kristaloj.Ve  
mallonge. Vaporiĝad'  
pro suna varmeg' , ĉu ne?  
Naturperfekte.

Kune kun  
suna elirad'  
arbarmedio viglas  
kaj strata promenado  
en urboj. Parad'.

Naturo  
vigle ŝanĝiĝas.  
Nokte dancos luno  
ĉar kara sun' laciĝos.  
Stela' origos.

*\*Sopir-al-sudo (ĉine:yijiangnan): ĉina fiksforma  
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
xa,xa,a (x=senrima).*

## Nikola Statkov

### Piedsignoj sur la neĝo

Kiu diabloigis ŝin sendi la versojn, kiu? Centfoje, milfoje ĉi tiu demando krucumis la pensojn de Viktoria. Sidante en la atendejo de la flughaveno, ŝi havis nenion por fari; la aviadilo malfruas, tempo por demandi – multe. Kaj ju pli multaj fojoj tiu historio turniĝis en ŝia kapo, des pli klare ŝi sentis sian kulpon, kiu, vekis en ŝi la dormantajn memorojn de la proksima kaj fora pasinteco....

Kelkajn jarojn, ili bone korespondadis kun maljunulo el Prago. Rakontante unu al alia okazaĵojn de sia infanaĝo kaj juneco, ili kuraĝigis sin pri la neevitebla malĝojo, kiu premis ilin, nun, fine de iliaj vivvojoj. Amikeco inter du animamikoj, vipitaj forte, dum jardekoj,de la ventoj de la tempo. Du animoj, en kiuj la ardantaj karboj de la vivo finbrulas antaŭ ol malvarmiĝi por ĉiam. Du soluloj, finirintaj siajn terajn

vivvojn sen ĝojoj kaj zorgoj pri infanoj kaj nepoj. Sen la eterna memtrankviligo, ke ili foriras, lasante post si karnon el sia karno por floradi la arbo de la gento.Viktoria kaj la maljunulo el Prago ne havis kialon por tiaj iluzioj: li estis vidvo sen heredantoj, ŝi ne konis la geedziĝon kiel aganta persono en ĝi. Kvin jarojn, ili skribis pli malgajajn olgajajn leterojn.Ĉiu sciis, ke frue aŭ malfrue tiu ĉi serena maljunula amikeco finiĝos, iun tagon unu el ili ne ricevos respondon de la alia. Ĝi estis tiel ĝis tiu tago, ĝis tiuj tagoj dum la pasinta somero....

En la subtegmento, inter la amasoj da libroj en iu kesto ŝi trovis paĝeton kun versoj, kiujn ŝi verkis antaŭ kvindek jaroj. Ili estis krio,de neniŭ aŭdita, de neniŭ legita. Ŝi rememoris, ke ŝi skribis ilin dum la nokto, kiam Li diris al ŝi, ke li ne povas, ke li ne ekzedziĝos. Trovinte la versojn, kiuj senutile kuŝis tie tiom longe, anstataŭ lasi ilin, ŝi senpripense tradukis ilin en Esperanton kaj sendis ilin por publikigo en Roterdamo-n, kie la revuo estis eldonata. Oni publikigis ilin.

Post unu monato,ŝi ricevis leteron el Zuriko. Viro, ankaŭ esperantisto, skribis al ŝi, ke al li tre plaĉas la versoj kaj komponis muzikon por ili, ian romancon. Li volis ekscii pli pri ŝi. Ŝi respondis al li, ne sciigante ke ŝia aĝo proksimiĝas al la jaroj sepdekaj kaj ke ŝi verkis tiujn versaĵojn antaŭ duona jarcento. Sian aĝon kaj tiun de la versoj,ŝi prisilentis. Sencele, ŝifaris tion: pro vanteco, pro ĝeno konfesi, ke maljuna virino kiel ŝi frivole montras la impulsojn de sia juneco.

Ŝi ricevis duan leteron. Kaj foton. Juna viro kun hela vizaĝo kaj bluaj okuloj ridetis de la foto. “Viaj versoj estas mirindaj: tiom da sufero fontas el ili...Vi estas poetino, kreu min, brila estonto vin atendas, vi ne suspektas, kiom talenta vi estas. Mi estos feliĉa, se mi povas legi aliajn Viajn versojn; kaj mi komponos muzikon por ili. Mi atentos. Bonvolu sendi foton, se vi povas...mi dezirus vidi la virinon, kiu tiel bone verkas kaj suferas tiel profunde...”.

Ĉi-foje, ŝi longe hezitis. Ŝi estis komencinta falsan ludon, kiu devis ĉesi, ne estis honeste daŭrigi ĝin. Tamen ŝi ne ĉesis. Al ŝi estis agrable, ke li laŭdas

ŝiajn versojn, ke li volas ŝian foton. Ie profunde en ŝi ekmoviĝis tavoloj, delonge senmovaj, delonge frostiĝintaj. Varmeta ekstremo varmigis ŝian koron, vekis ŝiajn sentojn. Dum tiom longa tempo, neniu rigardis ŝin kiel virinon. Por ĉiuj ŝi estis maljunulino, brogvundita de la vivo, solulino el ĉerpita por la pasioj de la vivo. Kaj nun: viro, komponisto.

Ŝi skribis respondon. Eĉ ne unu vorton pri la aĝo denove. Dankinte pro la foto, ŝi sendis sian. De ŝiaj studentaj jaroj, blankiĝinta, sed la knabino sur ĝi estis bela kiel ikono. Ŝi diris al si: finu la ludon! Tamen ŝi denove ne eltenis. La leteroj flugis de unu al alia, la mensogoj flugis. Ŝi mensogis sin prezentante junulinon. Malgraŭ ke ŝi sciis, ke la mildaj vortoj skribitaj de la komponisto estis por la knabino sur la foto, al ŝi estis agrable legi ilin, relegi ilin cent fojoj tage. "Kara, Viktoria..." Tiel komenciĝis ĉiu lia letero. Estis momentoj, kiam ŝi preskaŭ kredis, ke ĉiuj teneraj vortoj estas eldiritaj por ŝi.

Ŝi ekstaris antaŭ la spegulo. Tre maldensa hararo kun blankaj maldikaj radikoj, ne nigritaj de la farbo. Kelkaj haroj anstataŭ brovoj. Malgajaj okuloj, forlavitaj de la pluvoj de la tempo, sen brilo, sen koloro. Sensangaj vangoj –kaviĝintaj kaj pendantaj. Pinta nazo, velkintaj kaj palaj lipoj. Malsupren...maljuna kaj laca karno malstreĉiĝas sub la vestoj. Nenio alloga, nenio por igi viron rigardi ŝin per okuloj de viro.

La leteroj de la komponisto estis adresitaj al ŝi...la junulino vivinta antaŭ kvindek jaroj, sed ŝi ne ĉesis ricevi ilin, ŝi ne ĉesis respondi al ili. Ja, ŝia nomo estas skribita sur la kovertoj, ene, en la teksto estas ankaŭ ĝi. Finfine, ŝi estis tiu juna kaj bela knabino. Ŝi estis kaj ankoraŭ estas, sed plu ne estas....

Ĉu ŝi amis tiun viron? Ne, li povus esti ŝia filo. Sed estis plezuro por ŝia animo, sciis, ke li amas ŝin, ke ŝi estas amata, kvankam tio ne estas ŝi....

Iu forgesita tremo de ŝia juneco surrampis ŝin, kaj ŝi lasis sin al ĉi tiu tremo, kiu vekis ŝian animon, sen, ho ve, vekis la karnon. Ĉar ĉiu animo povas ekstremitate frumatene antaŭ la aŭroro, sed la maljuna karno –neniam. Viktoria timis la

mensogon, ke ĝi iam povas esti malkovrita, kaj tiam kien ŝi sin kaŝos pro honto. Ŝi timis ke la mensogo, povas iam disaperi kaj tiam kiel ŝi vivos sen iluzioj....

Do, ĝis hieraŭ, kiam ŝi ricevis la telegramon, per kiu la komponisto informis ŝin, ke li alvenas hodiaŭ per aviadilo de Zuriko. La novaĵo preskaŭ frenezis Viktoria. Ŝi decidis diri al li, ke Viktoria estas ŝia nepino. Forveturante eksterlanden antaŭ unu semajno; ŝi ne sciis, ke li venos, li devis averti ŝin ĝustatempe por ke ŝi atendu lin. Post unu monato kaj eble pli malfrue ŝi revenos. Poste li foriros kaj ŝi ne skribos eĉ unu leteron pli.

Kiu igis ŝin sendi la versojn tiam, kiu?!

Ŝi rekonis tuj vidante lin. Ŝi rapide rakontis al li pri sia "nepino" kaj ekspiris kunsente, alvokis taksion kaj kondukis lin hejmen. Li restos tri tagojn, li diris al ŝi, ĝis la sekva aviadilo al Zuriko, nenion por fari li havas se Viktoria ne estas ĉi tie. Kaj la avino estas Viktoria! Kiam li mencias ŝian nomon, li pensos pri la nepino.

Li eniris la gastĉambron, vidis la pianon kaj eksidis antaŭ ĝi. La romance, komponita por ŝiaj versoj plenigis la loĝejon, la malĝojaj sonoj ekflugis eksteren tra la malfermita fenestro. Li kantis la vortojn, ŝiajn vortojn de antaŭ kvindek jaroj. Ŝi ploris –mallaŭte, nereteneble. Tra larmoj ŝi diris al li, ke la muziko estas mirinda, tra larmoj ŝi petis lin pardoni ŝin pro tio ke ŝi ploras.

Tri tagoj plenaj je ĝojo: kun ĉi tiu juna kaj enamiĝinta viro, la vivo invadis ŝian hejmon. Tri tagoj de timo: li povus ekscii la veron. Dank 'al Dio, li suspektis nenion. Li rigardis la fotojn de la "nepino", parolis pri ŝi, laŭdis ŝiajn talentojn kaj belecon. Ĉu ŝi ne havas siajn proprajn fotojn, li demandis la maljunulinon. Ŝi atendis ĉi tiun demandon kaj estis preta por ĝi. Ŝi respondis, ke havas, sed ili estis en la provinco, en la domo de ŝia filo, kie ŝi loĝis kelke da tempo antaŭ ol finfine reveni en la ĉefurbon. Filo, bofilino, nepo

La mensogoj estiĝis pli kaj pli. Ŝi rakontis al li fascinajn rakontojn de la infanaĝo kaj nuntempo de la "nepino". Ŝi rakontis al li pri sia propra vivo.

Dum la tago ili ne haltis eĉ por unu minuto: ŝi kondukis lin tra la urbo, montris al li artajn galeriojn, muzeojn, preĝejojn. Ili ambaŭ bedaŭris, ke ne estas

koncertoj ĉi-semajne. Ili ankaŭ iris al Vitoŝa<sup>1</sup>. Li staris sin forgesinta antaŭ la morenoj, diris ke kiam li rigardas ilin, li aŭdas la tondradon de ilia kreo, vidas kiel ili naskiĝas el la magmo.

Ili reiris hejmen post vesperiĝo. Li eksidis ĉe la piano kaj ludis.

La ĉarmaj sonatoj de Giovanni Platti sonis la unuan nokton. Idiliaj barokaj bildoj vicis unu post la alia en la malrapidaj partoj. Poste la tonoj rapidiĝis, kvazaŭ Diana<sup>2</sup> persekutis spiregantantan cervon per sia pafarko meze de la sunbanata arbaro.

Viktoria aŭskultis ... Bela nudpieda knabino kuris tra la herbejoj. Abeloj zumis meze de la herboj. Birdoj trilis en la proksimaj arboj. Fore la Balkano<sup>3</sup> subtenis la ĉielon per siaj potencaj pintoj. La knabino kuris tien por atingi la fonton sub la plej alta pinto, por trinki akvon, por rigardi sin en ĝi kaj vidi ne infanon, sed junulinon, obseditan de perpleksaj emocioj...

La duan nokton, alflugis la "Kukolo" de Claude Daquin. Lia dekstra mano denombris egalritmajn dekseksonojn, kaj lia maldekstra kriis la konatan printempan voĉon – "Ku-ku, Ku-ku." Ĉiuj horloĝoj en la mondo tiktakis, kaj de ĉiu el ili la kukolo sinaŭdigis, kvazaŭ la sorto disdonis destinojn.

Viktoria aŭskultis.

La kukolo tiam kukolis al la junilino pri amo. Ŝi estis deksep jara, kiam ŝi iris al tiu koncerto kaj vidis la direktiston. Ŝi komprenis, eksentis, ke tio estas Li.

La trian vesperon: soneto numero 104 de Liszt sur la sonetoj de Petrarca. La poeto ne povas trovi pacon, li ne volas vivi sen sia amata Laura. Poezio en sonoj estas surverŝita de larmoj kaj duboj, dieca konfeso supreniras al la ĉielo.

Viktoria aŭskultis... Ŝi volis vivi por Li, morti por Li. Nek unufoje, eĉ en sonĝo, ŝi ne anstataŭigis lin per alia. Ŝi amis lin kiel infanon, kiel viron, kiel dion. Ŝi amis lin pli ol sin mem. La amo plenigis ŝian animon je helo, ŝian koron je ekstazo. Ŝi kredis, ke ne estas fino de ĉi tiu himno, kiun ili ambau kantis, ke estas senfina ĉi tiu pasio, kiu ekbruligis ilin.

La soneto finiĝis. Ŝi sin levis de sia sidloko kaj iris al la piano. Malfermis sian buŝon por diri ion. Ŝi ne povis. La komponisto rigardis ŝin kaj liaj fingroj glitkurissur la klavoj. "Piedsignoj sur la neĝo", preludo de Claude Debussy. Iu sopiro delonge paliĝis, kiel la lumo paliĝas en la mallumo. La amata silueto krias de ie malproksime de la memoroj. La neĝo knaras sub la pezaj paŝoj. Frosto kaj malpleno.

...Li diris al ŝi, ke li ne povas, ke li ne forlasos sian edzinon. Ili disiĝis. Virojn en sia vivoŝi ne plu havis. Ŝi instruis muzikon al la infanoj kaj longan tempon ŝi iris nur la vojon de ŝia hejmo al la lernejo. Ŝi ne havis amikojn, nur konatojn. Ŝi emeritiĝis kaj ne eksidis ĉe la piano dekkvin jarojn. Ŝi eklernis la lingvon Esperanto kaj kontaktis diversajn homojn tra la mondo. Kaj kun tiu maljunulo el Prago, kun kiu ili skribis pri la vintro de sia vivo. Ĉio estis malantaŭ ŝi, en la pasiteco, eĉ la iluzio kun tiu ĉi viro sidanta antaŭ la piano. Antaŭ ŝi – nenio... Ŝi metis manon sur lian ŝultron kaj flustris:

–Mi estas Viktoria. Li kapjesis:

–Mi scias.

Ŝi laŭtigis sian voĉon:

–Mi estas la ununura... Alia ne ekzistas... La viro milde ridetis:

– Mi scias.

Kaj li denove sin klinis super la piano.

### **Notoj**

<sup>1</sup> Vitoŝa – monto apud Sofia, la ĉefurbo de Bulgario

<sup>2</sup> Diana – diino de la ĉaso en la romia religio

<sup>3</sup> Balkano – montaro en Bulgario nuntempe nomata Stara planina

### ***Elbulgarigis***



**Hasan Jakub Hasan**  
(Bulgario)

(gajninto de Dua Premio en Nacia konkurso por traduko)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

[www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm](http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm)

